

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

N-o 43, 31. Julio 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

\* Eliras semajne. \*

# Al Dresden kaj Praha.

## Kie okazos nia XIV-a? :: Nepermeso de la Postkongreso en Budapeŝt.

**K**iam ĉi tiu numero eliras, la pli granda parto de la kongresanoj jam estas ekvojaĝintaj al nia mondfesto. El ĉiuj anguloj de la mondo ili alrapidis, el proksimaj kaj malproksimaj landoj, por kunefiki, ke la kongresoj de Dresden kaj Praha fariĝu plej brilaj manifestacioj pri la multflanka uzobleco, la forta vivo kaj granda disvastiĝo de Esperanto.

Ankaŭ la redaktoro de ET jam forvojaĝis, kaj en la redaktado dum la kongressemajnoj lin anstataŭas lia frato. Se pro tio eble la enhavo aŭ la stilo ne estos tute konformaj al la ĝisnuna kutimo, ni petas senkulpon; granda sukceso sendube jam estas, ke ET povas daŭrigi sian tute regulan aperadon ankaŭ dum la kongressemajnoj.

Ni esperas, ke en la venonta numero ni povos doni detalan raporton pri la antaŭkongreso en Dresden kaj pri la malferma kunsido de la kongreso en Praha. En Praha ni aranĝos publikan poekzempleran vendadon de ET.

Ni nun deziras al ĉiuj kongresanoj bonan alvenon en la ĉefurbo de la ĉeĥoslovaka respubliko, nunjare ankaŭ ĉefurbo de Esperantujo, kaj belajn kongrestagojn, kaj al la kongresoj mem ni deziras ĉian sukceson!

*Red. kaj Adm. de ET.*

### Kie okazos nia XIV-a?

Laŭ nia scio, ĝis nun nur la Libera Urbo Danzig aŭdigis la intencon inviti la XIV-an Universalan Kongreson de Esperanto.\*) Kaj la finnoj samideanoj esprimis la deziron saluti la XV-an en sia ĉefurbo Helsinko en 1923. Eble la poloj invitos la XVI-an al Varsovio, ligante kun ĝi la starigon de monumento al d-ro Zamenhof.

Oni povas havi diferencajn opiniojn pri la utilleco de l' okazigo de tri-kvar sinsekvaj Universala Kongresoj en preskaŭ la sama (konsiderante la vastan terglabon) regiono; ĉar de Praha al Danzig, kaj de Danzig al Helsinko, kaj eble de Helsinko al Varsovio estas relative tre proksime.

Ĝis nun niaj kongresoj estis festitaj ĉiujare en sufiĉe diferencaj lokoj kaj landoj, precipe se ni konsideras, ke la kongreso de Bern estis destinita por Genova. Laŭ tio ni ricevas jenan sekvon de landoj, kie okazis niaj ĝisnunaj kon-

\*) Lastore, kiam tiu ĉi artikolo jam estis kompostita, nin scigis varsoviaj samideanoj, ke ili intencas inviti la XIV-an al Varsovio.

### Provizora Vortaro de oficiale rekomendataj lingveroj (ideosignoj) (R. V.).

La dua el la du plej urgaj taskoj de la esperantologio.  
*De Eugen Wiltser.*

La centra revizio kaj prilaborado de la lingva materialo, komencita per okupiĝo pri la tri fundamentaj reguladoj, devos esti daŭrigata: necesas, per esploro farata kun specialistaj scioj kaj granda zorgemo forigi la multajn dubindaĵojn en la formo kaj signifo (vortkaraktero) ankaŭ de la ceteraj vortelementoj.

Sed se oni konsideras, ke ĝis hodiaŭ oni preskaŭ tute ne okupis sin pri tiaj aferoj kaj tial la materialo ankoraŭ devos esti kolektata (granda parte, estas vere, tio jam okazis en nia vortaro); ke apenaŭ ekzistas vera(j) esperantologo(i) kun prete elformitaj — bone bazitaj — opinioj eĉ nur pri la principoj; ke pli pezaj organizajtoj ol la L. K. kaj la Ak., de kiuj iaj homoj postulas aŭ eĉ esperas la revizion, malfacile estas imagebla — tiam ne povas esti dubo, ke, eĉ se oni komencos jam morgaŭ, tiu sistema deorigina procedo postulos jardekojn (se nenio ŝanĝiĝos intertempe). Aliflanke ĉiutage plilaŭtiĝas la krio de la veraj uzantoj de Esp-o, ke la praktika postulo de interkompreno (v. la unuan artikolon) per ĝi hodiaŭ ankoraŭ estas neniel plenumata, ke oni urĝe bezonas unuece uzatan lingvo-provizon, ankaŭ fakan; alivorte, ke oni fine volas vidi la „Provizoran Vortaregon“ (v. la unuan artikolon).

El tio ni konkludas, ke flanke de la neprokrastebla okupiĝo pri la tri fundamentaj reguladoj devas

grosjoj: Francujo, Svislando, Anglujo, Germanujo, Hispanujo, Usono, Belgujo, Polujo, Svislando (anst. Italujo), (Francujo), Usono, Nederlando.

Laŭ tiu ĝisnuna kutimo nia XIV-a devos okazi eble en Italujo, Portugalujo aŭ Svedujo.

La okazigo de tri-kvar sinsekvaj kongresoj ne malproksime unu de l' alia do estus nova taktiko: ĝia celo povus aŭ devus esti la kiel eble plej intensega propagando por Esperanto en la najbaraj ŝtatoj, malgrandaj aŭ ekonomie malfortaj, de orienta (kaj centra) Eŭropo, por unue tie konduki Esperanton al la venko. La grandaj aŭ ekonomie fortaj ŝtatoj de okcidenta Eŭropo kaj la amerikaj ŝtatoj tiam sekvus per si mem.

Tamen pro tio la egalmezura internacia disvastiĝo de Esperanto devus suferi. En landoj, kie la intereso por Esperanto ne estas dum kelkaj jaroj almenaŭ unufoje revekata per tia konvinko manifestacio, kia estas internacia kongreso, la movado ŝtoniĝas, ne progresas.

Jen kio estas diskutota dum la Praha Kongreso.

Niaj Danzig'aj samideanoj ja laboras fervorege, kaj ili plene meritas, ke — por kroni ilian fervoron — la XIV-a estu okazigata en ilia urbo. Jam ili sukcesis interesi la Senaton, kiu skribis la 8-an de junio al Danzig'a Esp. Asocio:

„Respondante vian skribaĵon de 31. majo 1921 rilate inviton de Universala Kongreso de Esperanto mi komunikas al vi post pritraktado de via propono en senata kunveno de 3. junio, ke Senato tre favoras la okazigon de la kongreso en Libera Urbo Danzig kaj volonte subtenos vin ĉiumaniere laŭ via deziro.

Subskr. D-ro Ziehm.“

Por la kongreso mem jam estas signitaj konsiderindaj sumoj de firmoj, bankoj kaj privataj personoj. Interalie estas vigla intereso, eĉ entuziasmo inter plej eminentaj aktoroj de la urba teatro. Nomoj de Merz, Bühring, Herder havas bonan famon. Oni intencas, dum la kongreso prezenti „Ifigenion“ de Goethe, kiu jam estis prezentata en Esperanto dum la internacia kongreso en Dresden.

Do, se la invito de la Danzig'anoj estos akceptata dum la kongreso de Praha, ni povos esti certaj, ke ili kondukos la XIV-an al granda sukceso; ĉar ili jam longtempe kaj ŝajne bone pre-

kiel eble plej baldaŭ komenciĝi la kompilo de provizora „provizora vortaro“, malpli granda ol la aspirita relative definitiva R. V. Ni rigardu, kio pledas por tia provizora R. V., respektive kiel ĝi devos esti aranĝata por kontentigi tiujn postulojn.

1. Jam en la unua artikolo ni gajnis la vidpunkton, ke, por kontentigi la praktikan postulon, ĉiu fundamenta lingva laboro devas esti centra kaj ĝiaj rezultoj devas esti centre deponitaj, ĝenerale alireblaj ne nur por tiu, kiu volas reprodukti ideon per esprimo, sed ankaŭ por tiu, kiu volas retrovi la ideon (signifon) de tiu esprimo. Koncerne l'on unuan la rekomendindaj esprimoj eĉ devas esti kvazaŭe altrudataj, t. e. metataj antaŭ la okulojn se iel eble de ĉiuj esp-istoj, ĉar ankaŭ la jam ekzistantaj fakaj nomenklaturetoj preskaŭ tute ne estis atentataj, eĉ ne de la vortaristoj. Jen la sola eblo, atingi unuecan lingvuzon.

Tiu necesajo estas plej simple kaj plej efike plenumbla, se, antaŭ la apero en la formo de libro, en almenaŭ po unu gazeto de la diversaj lingvoteritorioj estas presata la esp-a parto de la vortaro kun la respektivaj nacilingvaj tradukaĵoj; por ebligi tion, kredeble plej bone estus, unue aperigi kvinkolonajn (EAFGR) en centra gazeto.

Ĉe uzo de la gazetoj ankaŭ la financa flanko de la afero estus pli facile regulebla.

2. La vortaro devas esti ordita nek alfabete laŭ la esp-a nek laŭ nacilingva parto, sed laŭ la ideoj (troveblaj per indekso de signovortoj): ĝi devas esti „sistema“. Ĉar

a) la ĉefa eldono ebligu al anoj de kiel eble plej multaj lingvoteritorioj trovon tiel de nacilingvaj kiel ankaŭ de esp-aj lingveroj.

paris ĝin. Estraroj, ĵurnaloj, publiko estas favoraj; asocianoj fervoraj, laboremaj, eble eĉ iom tro entuziasmaj; urbo facile alirebla, precipe por germanoj, poloj, finnoj, baltaj kaj skandinavaj landoj; kostoj moderaĵ pro la malalta valuto. Cetere la urbo estas interesa, historia, grava, kvankam ne tre granda (ĉ. 200 000 loĝantoj).

Nu, ni atendu la decidon de la kongreso en Praha; sed ni supozas, ke ĝi plezure akceptos la inviton de la Danzig'anoj.

### D-ro Giesswein

plendas en la hungara parlamento pri la kontraŭ-esperanta konduto de hungaraj estraroj.

Pro la nealveno de esp. gazetoj, precipe de ET, al hungaraj abonantoj, parlamentano prelato d-ro Giesswein faris en la hungara parlamento grandan paroladon, al kiu komerca ministro L. Hegyeshalmi respondis, ke li jam esploris la aferon, sed ke la kulpo ne estas ĉe la poŝto sed verŝajne ĉe la cenzuro. Li promesis fari la necesajn paŝojn ĉe la koncernaj instancoj.

Plue d-ro Giesswein plendis pri malpermeso aranĝi esp. landan kaj internacian postkongreson en Budapeŝt.

Estas je tre strange, ke la ĉefpolicestro de la hungara ĉefurbo ne konsentas al aranĝo de esp. kongreso. Ĉiu alia urbo aŭ lando en la mondo plezure gastigus tiel gravan kongreson kaj eĉ helpus laŭeble — per moralaj kaj materialaj rimedoj — al ĝia sukceso. Do oni sin demandas: Pro kio tiel stranga konduto? Ĉu la ĉefurbo de l' Hungarlando devas honti, ke ĝi timas viziton de eksterlandanoj? Ĉu ĝi perdis sian laman mondkonatan brilon kaj kulturon? Ĉu la teruraj okazintaĵoj de la postmilita tempo detruis ĉion, pri kio Budapeŝt iam prave fieris? Jen kion oni ne povas kompreni, jen vere stranga konduto!

Kiam ni ricevis la unuan poŝkartan scigon pri la nepermeso de la postkongreso, ni ne volis kredi tion, precipe ĉar la scigo ne venis de nia kutima korespondanto. Ni kredis, ke ĝi estis malbona, malica ŝerco kaj ne enpresis ĝin en nia antaŭa numero. Sed kiam intertempe ankaŭ de aliaj flankoj ni sciiĝis pri la afero, ni fine devis kredi. Ni ankaŭ legis en n-o de gazeto „Pester Lloyd“ (14. julio) similan sed iom vualitan kaj

b) la vortara laboro devas okazi kun konsidero al ĉiuj analogiaĵoj kaj tiel la ideoj kaj granda parto de la formaj analogiaĵoj jam estas kunigitaj; do ĉe la poparta aperigo nenia nenatura sinsekvo bezonos esti atentata, sed tiuj partoj, kiuj estas aŭ speciale urĝe bezonataj aŭ plej facile fineblaj, povos eliri la unuaj. Ankaŭ la multaj klarigoj pri la ideoj, necesaj ĉe alia ordo, tiel fariĝas superfluaĵoj.

c) facile apartaj eldonoj por la diversaj fakoj povos esti aranĝataj.

d) speciale por la legantoj de la gazetoj (v. sub 1) kreskos la intereso pri la vortaro malgraŭ la poparta publiko; la revuoj ja hodiaŭ jam de tempo al tempo prezentas tiajn kompilaĵojn kiel materialon por ekzercoj de konversacio.

3. La vortaro ne estu tro ampleksa; ĉar a) ĝi ja estu finita post ne tro longa tempo kaj por la profito de unu fako ne povas atendi ĉiuj aliaj.

b) la interna konsekveneco de la vortaro, precipe pro la manko de direktantaj ĉiovidaj esperantologoj, ne estus efektivebla. (La ĝisnunaj, ankaŭ fakaj, vortaroj estas plenaj de kontraŭdiroj inter si kaj okaze ankaŭ en si mem.)

Egalmezure en ĉiuj partoj estu malkrudigata la lingva materialo.

c) la vortaro antaŭ finiĝo de la deorigina revizio povos esti nur relative neperfekta.

d) por ke la vortaro posedu sufiĉan interesecon por la legantoj de la gazetoj (v. sub 1), estas necese, ke la ideoj estu pli malpli konataj al ili, do ne tro specialaj.

4. Ne pure esp-a laboro, do precipe la elekto kaj aranĝo de la nomataj ideoj kaj la kolekto de la nacilingvaj ekvivalentoj, estu evitataj, por kiel eble plej rapidigi la aferon.

falsigitan (eble pro la cenzuro) scilgion. La tuta afero estas ankoraŭ enigmo por ni. Espereble oni povos ĝin malkaŝi; ĉar tia kontraŭkultura konduto estas en la hodiaŭa tempo ne komprenebla.

Tamen samideanoj, kiuj intencis partopreni la postkongreson en Budapeŝto, povos viziti la urbon kaj estos certe gastame akceptataj de la budapeŝta esperantistaro, kiu ja mem ne estas kulpa pro la malkulturo de sia registaro.

Jus antaŭ ni komencis presi nian ĵurnalon, alvenis karto el Budapeŝto kun jena teksto:

„La postkongresa ekskurso al Budapeŝto nepre okazos. Venu ĉiuj viziti ĉi tiun vidindan urbon! La nepermesado por kongreso ne koncernis esperanton mem. Gastame oni akceptos ĉiujn! Anoncu vin en Praha! Hungara Esperanto-Servo.“

## Io-ujo.

Petoj, admonoj, minacoj, promesoj pri eventuala materia gajno, ĉiam plimultiĝintaj en lasta tempo, premis al mi — post longa intenco silentado — denove la plumon en la manon por klarigi miajn argumentojn rilate la landnoman finaĵon. Mi faros tion en plejble konciza kaj afera maniero.

Nuntempe ekzistas 5 eblecoj por signifi la landnomojn: 1. per kunmeto kun „lando“; 2. per sufikso „-uj-“; 3. per sufikso resp. dua radiko kun „-i-“; 4. per adjektivo kun kompletigota substantivo; 5. per nacia nomo.

Pri ĉiuj formoj krom la 3-a regas unuanimeco rilate laŭfundamentecon, pri la 3-a nur, se „-i-“ ne estas konsiderata kiel sufikso, sed kiel apartenaĵo al (internacia, historia) radiko. Ekz.: 1. Aŭstrolando, 2. Aŭstrujo, 3. Aŭstrio, 4. Aŭstra (komplando), 5. Oesterreich.

La formoj 1—3 estas la ĝenerale uzataj, dum la formoj 4—5 oni uzas maloftege, kvankam la formo 4 estas la plej simpla el ĉiuj, ekz.: (la landoj) Angla, Franca, Hispana, Itala estas en Eŭropa (kontinento); (la landoj) Kanada, Venezuelo, Brazilo, Argentino en Amerika (kontinento).

El la formoj 1—3 la 3-a estas la plej simpla, ĉar ĝi konsistas nur el la unu fleksigebla vokalo „i“; krome ĝi estas la plej internacia kaj malplej kripligas la nomojn. Do ĝi estas preferinda antaŭ la formoj 1 kaj 2.

La demando estas, ĉu tiu formo estas kontraŭfundamenta aŭ ne. Se oni rigardas ĝin kiel pseŭdosufikso, kiel apartenaĵo al la radiko (ekz. per si mem ĉe Italo, Bulgario, aŭ per unuecigo kaj reguligo ankaŭ ĉe la nehistoriaj radikoj Svisio, Anglio ktp.), ne ekzistas demando pri kontraŭfundamenteco. Se oni ĝin rigardas kiel veran sufikson, tiu demando estiĝas:

a) En la listo de la sufiksoj oni ne trovas iun koincidantan kun alia radiko. Sed la supozata sufikso „-i-“ koincidas kun la infinitiva finaĵo. Tamen tio ne estas sufiĉa argumento por ĝia kontraŭfundamenteco. Ĉar en nia lingvo ekzistas la tabelvortoj „iu, io, ial, iam ktp.“, kies unua parto ankaŭ koincidas kun la infinitiva finaĵo „-i“ kaj kies dua parto koincidas kun alia fundamenta finaĵo aŭ radiko (iu = infinitivo kaj imperativo, io = la substantivigita infinitivo = laŭ Antido „ado“, ial = infinitivo kaj prepozicio, iam = infinitivo kaj verba radiko „am-“). Kaj se „-i-o“ (tabelvorto) koincidanta kun i (infinitiva) kaj o (substantiva finaĵo) ne estas kontraŭfundamenta, ankaŭ „-i-o“ (landnoma sufikso kun substantiva finaĵo) koincidanta same kun i (infinitivo) kaj o (substantivo) ne povas esti kontraŭfundamenta. Cetere, mi neniam trovis, ke la uzado de „-io“ (tabelvorto) aŭ de „-io“ (landnoma sufikso) rezultigis iun ajn malkomprenajn.

Tio estas ebla per utiligo de jam ekzistanta plurlingva sistema vortaro.

5. Oni komisiu pri la verkado de la provizora R. V. ne grandan organizaĵon similan al la L. K. — alie ree nenio rezultos — sed unuopan personon, kiu en relativa kompleto posedas la kvalitojn, kiujn ni postulis pri esperantologo. Tiu persono siaflanke devos partopreni en sia laboro kiel konsilantojn kaj kontrolantojn kiel eble plej malgrandan nombron de samlokuloj taŭgaj por esperantologia laboro: por ĉiuj nacia lingvo unu, kiu ĝin posedas kiel patrinan lingvon, same po unu por la specialaj fakoj; por Berlino ekz. ni scius facile montri tiajn kunlaborantojn. Ĉar oni de la komenco ne povas posedati la necesajn fidon kaj konfidon al la koncernanto, unue specimeno povus esti petata kaj ekzamenata de la E. K.; pli poste inter la apero en la gazetoj kaj en aparta libro vere atentindaj kontraŭdiroj — la ebleco de tiaj estas tre neverŝajna ĉe la rekomendita maniero procedi — ankoraŭ povus esti konsiderataj. Ĉe la diversaj lingveroj estus bone, per eksponentaj indeksoj (aŭtorsignoj) montri la aŭtorojn ilin jam apogantajn, kiel ni faris ankaŭ en nia vortaro.

Kontraŭ tiu proponita provizora R. V. eble oni diros, ke, kiel citite sub 3c, nur tre relativa perfekteco estas atingebla, kaj ke laŭ 5 la rezultado dependos de kelkaj malmultaj personoj: Malgraŭ tio alia aŭ almenaŭ pli bona rimedo forigi la nunan dilemon ne ŝajnas al ni trovbla. Ĉar unue ja certe estas pli bone, kiel ajn oni pensas pri la organizo de la vortara laboro, se post mallonga tempo ekzistos centra vortaro ellaborita laŭ esperantologiaj principoj de unu sola kaj, pri sia parto, fine plenumos la praktikan postulon,

b) La sufiksoj en Esperanto estas memstaraj radikoj. Do, se ni aplikas „-i-“ kiel landnoman finaĵon, ni devas povi ĝin apliki ankaŭ kiel signifon por „lando“. Mi asertas, ke ni povas tion per „-io“ same kiel per „ujo“. „Ujo“ signifas origine „enhavilo“, „io“ signifas „quelque chose, anything, etwas“. Nu, lando estas „enhavilo“ de provincoj, montoj, valo; kampoj, riveroj, urboj, vilaĝoj, homoj, bestoj; kaj lando estas ankaŭ „io“, quelque chose, anything, etwas, ekz. Germanio, Svisio estas efektive io germana resp. io svisa. Nur per malvastigo de la origina senco de „ujo“ resp. „io“ oni povas ricevi la novan pli precizan signifon „lando“. Tamen ĝis nun mi nenie vidis, ke iu ajn uzis la sufikson „ujo“ kiel memstaran vorton por signifi „lando“ (mi mem faris tion unufoje ŝerce); do oni ankaŭ ne bezonas uzi „io“ memstare por signifi „lando“. Ja por tio ni havas propran vortradikon „land“!

Do, el la sub a) kaj b) dirita argumentiĝas, ke la „kontraŭfundamenteco“ de „-io“ estas neniel pruvita. Aŭ — se „-io“ estas kontraŭfundamenta, la fundamento mem (aŭ parto de ĝi) estas kontraŭfundamenta, nome la tabelvortoj.

La disputo pri „-io“ do estas harfendo, kaj per obstina kontraŭstaro al la enkonduko de „-io“ oni nur eternigos tiun disputon.

La sankcio de „-i-“ kiel landnoma sufikso (resp. de specialaj vortradikoj finiĝantaj per -i- por la landnomoj) prezentus ankoraŭ grandan praktikan valoron, tiun de unuecigo kaj reguligo, kaj unufoje por ĉiam finus la kaoson nun ekzistantan en la necerteco, ĉu oni devas derivi iun landnomon de l' nomo de la loĝantoj aŭ la nomon de la loĝantoj de la landnomo; oni ricevas en la tuta vico la tri signifojn por gento, lando kaj landano, kaj jam neniu lernanto kaj „perfekta“ esperantisto farus erarojn; ekz.

italo,	Italo,	Italiano
vestfalo,	Vestfalia,	vestfaliano
aŭstro,	Aŭstrio,	aŭstriano
argentino,	Argentino,	argentiniano
paragvo,	Paragvio,	paragviano
peruvo,	Peruvio,	peruviano

Kiel Esperanto difektis aliloke la originan (historian) aspekton de multaj vortoj, pro la principo de unuecigo kaj reguligo, ĝi ankaŭ rajtas fari tion ĉe la landnomoj. Unuforme kaj reguleco estas praktikaj kaj forigos ĉian kaoson, kiu cetere — laŭ mia opinio — ne konsistas en la apuda uzado de -lando, -ujo kaj -io, sed en la nereguleco de la derivado de la nomoj per la landoj resp. per la gento.

Mi eĉ dezirus la regulecon tia, ke ĝi estus aplikata ankaŭ ĉe la kontinentoj, insuloj, liberurboj kaj ĉe la siranga formo Usono (do Usonio). Sed eble per tio ni jam tuŝis la fundamenton.

Konklude, se oni volas fini la disputon pri la landnoma finaĵo, jam sufiĉe longe daŭranta, la plej praktika vojo estus la simpla sankcio de „-i-“ kiel landnoma sufikso (resp. de specialaj vortradikoj finiĝantaj per „-i“ por la landnomoj). Aliaj vojoj estas, ke oni plene silentadu pri la afero kaj atendadu, ke la tempo, la praktika uzado, la libera eksperimentado\*) decidu, aŭ ke oni per interkonsento unufoje por ĉiam fiksu la nomon por ĉiu unuopa lando (simile al la propono de d-ro Privat). Pri unu el tiuj tri eblecoj oni devas decidiĝi, alie la disputo eterniĝos por la plej granda malbono de nia movado.

Petoj, admonoj, minacoj, promesoj estas malbonaj argumentoj por rompi ies konvinkon. Multaj esperantistoj, inter ili diversaj redaktoroj de esp. gazetoj, ja forlasis la uzadon de „-io“ por ne plu havi malagrablaĵojn; ili faris la „noblan geston“

ol se ĉiuunuopa uzanto de Esp-o devas blindpalpante pli malpli arbitre elekti siajn esprimojn; esprimojn, kies signifo nenie estas deponita. (Unu kvazaŭe centran vortaron la esp-istoj jam havis, nome la esperanta-germanan de Zamenhof-Jürgensen; se oni trarigardas la ducenton da esp-aj vortaroj kaj la literaturon, oni estas frapata de stranga kontrasto: Pri la malmultaj esprimoj trovigantaj ĉe Z.-J., malgraŭ iliaj sufiĉe multnombraj malbonaĵoj, regas preskaŭ plena unueco, dum ĉio alia estas kaosa kaj stagna de jardekoj.) Plue rezultas ĝuste el la esenco de la esperantologia labormaniero, ke la persona elemento ĉe la verkado de la R. V. preskaŭ tute malaperas. La direktanto de tiuj laboroj neniel decidus libere kiel unuopa persono sed, ju pli konsciencie li procedas, des pli okazigas nur kvazaŭe kiel objektiva pesanto voĉdonon inter la argumentoj; voĉdonon, kies rezultato sen la partopreno de lia flanko trudiĝas per memaga mekanismo. Ĉar la nombro de la argumentoj kuŝas kompleta antaŭ li, li apogas sin sur ĉio ĝis nun ekzistanta, kaj ĉiu el la argumentoj havas pli malpli absolutan forton; ni ree kaj ree observis, kiel okulfrape akordas la rezultatoj, al kiuj venis homoj esperantologie disponitaj, se ili sisteme konsideras ĉion deciditan kaj ke malsamaj opinioj devenas nur de nevido aŭ ignoro de laĵ, ĉe la diversaj personoj malsamaj argumentoj. Kaj se tamen renkontiĝos aferoj, pri kiuj aŭtoritataj esp-istoj havas aŭ verŝajne havus alian opinionon, homo sincere klopodanta pri objektiveco ĉiam povos trovi moduson, kiel konformiĝi al ambaŭ konceptoj (aŭtorsignoj!).

Dripensante la detalojn pri la elektenda sistema vortaro, t. e. la amplekson, la landon de la eldonejo ktp. ni tiris la konkludon, ke plej bone por la skizita celo taŭgus la eldono en Germanio

aluditan de d-ro Corret en sia artikolo por ne ofendeti per akcentado de sia propra opinio niajn certe meritplenajn kaj respektindajn akademianojn. Ankaŭ mi jam hezitis, ĉu ne estas preferinde konformiĝi al la ĉiam pli insistaj petoj, admonoj, minacoj kaj promesoj de d-roj Cart, Corret kaj aliaj nur-ujo-anoj, kaj foje mi skribis, ke mi volus rezigni je la uzado de -io, se ankaŭ ĉiuj aliaj redaktoroj rezignus, por ke la paco en Esperantujo estu restarigata, kaj por ke niaj plej bonaj spiritoj, kiuj nun foruzas sian valoran tempon pro bagatelo verkante longajn artikolojn kontraŭ -io, povu denove praktike labori. Sed pli bone jam estas, se la demando estos definitive klarigata, per unu el la supre menciitaj tri vojoj. Mi esperas, ke tiu ĉi klarigo okazos baldaŭ. T. J.

\*) Sed tiam oni devas kompreneble ĉesi ataki la io-anojn kiel malfidelulojn al la fundamento.

## Opinioj pri Esperanto.

S-o Justin Godart,

deputito de la franca parlamento (radikalsocialista partio), eks-vicministro de la sanitara fako de la armeo dum la milito, estas malnova amiko de Esperanto. Varbite de sia bopatro, la bedaŭrata s-o Cohendy, profesoro de juro en Lyon'a Universitato, li dum la milito, estante ministro, oficiale rekomendis Esperanton en la hospitaloj.

En artikolo pri „Lingvo Internacia“ en ĉiutage „L'Ère Nouvelle“, Paris, de 4. aprilo, li skribas interalie:

... Tiam oni serĉas: charabia, petit nègre (diversaj specoj de jargonoj; rimarko de la tradukinto), fina konfuzo ktp. En tiu ĉi fako Esperanto estas forta, ĉar ĝi respondas al ĉiuj juĝantaj ĝin tiamaniere: „Eksperimentu, dokumentigu!“ Ĉiu homo bonfida akceptonta tiun ĉi inviton, estos devigata rekoni, ke Esperanto estas scienco konstruita, ke ĝi estas elprenita unumaniere el ĉiuj konataj idiomoj, ke ĝiaj vortoj havas seriozajn etimologiojn, ke ĝi estas vivanta, fleksebla kaj harmonia.

Delonge ĝi submetiĝis al la uzado, kiu konstatas aŭ eligas. Esperanto venke kontraŭstaris; ĉiuj uzintaj ĝin havis nentan seniluziĝon: kaj tio estis por ili tia ĝojo, ke speco de fido animigis ilin kaj puŝis ilin al la apostolado.

Por vivi, la Societo de Nacioj devas esti societo ne de registaroj sed de popoloj. Tiuj ĉi bezonas, por ke la milito estu forigata, konatiĝi. Lingvo Internacia estas bezona por ili. Mi estas konvinkita, ke Esperanto respondas plej bone al ĉi tiu bezono, kaj ke ĝi helpos fondi la regnon de la universala paco.

## Mallongaj Esp. Scilgoj.

Delegito de Pariza Foiro al Praha.

S-o Cuzon estas elektita oficiala delegito de la pariza foiro por la kongreso de Praha.

El Budapeŝto.

La 16-an de julio la kunvenintaj komitatanoj kaj membroj de la Landa Societo en la Socia Muzeo decidis per voĉdono, ke pro nepermeso de la Postkongreso oni ne aranĝos oficialajn esp. festojn post la Praha Kongreso; sed se fremduloj vizitos Budapeŝton, oni gastame gvidos ilin kaj ebligos laŭeble agrablan restadon.

La 19-an de julio alvenis la scilgo pri la morto de Antoni Grabovski, pri kiu parolis Paŭlo Balkanyi kaj laŭlegis kelkajn el liaj poemoj. D-ro L. Lorand proponis aranĝi post unu monato apartan memorfeston. Mihaelo Sarossy kantis la „Tagiĝon“ de Grabovski.

„Vortoprovizo de Hecker“; tiu libro jam havas ankaŭ esp-an kolonon, malmulte taŭgan, kaj estas ricevebla en eldonoj seslingva (AFGIRE) kaj ankaŭ dulingvaj (E, nacia l.). Diversaj nacilingvaj tradukaĵoj ja devus esti korektigitaj, kelkaj konceptaĵoj eble estus enŝovendaj, sed jen kio jam estas negravaĵoj.

Restas ankoraŭ la demando, kiun ŝarĝi per la ellaboro de la provizora R. V. Ni esperas, ke la esp-istaro trovos iun, kiu prenos sur sin la taskon kun plena konscio pri la prirespondeco kun ĝi ligita. (Por la kazo, ke oni trovos neniun, ni pensas, ke ĉe konsento de la gazetoj, prefere ni mem akceptus inviton, aranĝi la aferon, ol vidi plue daŭranta la nunan aferstaton, en kiu propagandisto de Esp-o estas duona trompisto.)

Kaj se vere iu (preskaŭ) esperantologo disponanta nian materialon ricevas kaj akceptus la komision, — ni garantias, ke unu monaton poste povus aperi la unua kvinkolono kaj ke post ne tro longa tempo ekzistos la unua internacia vortaro konforma al la esperantologiaj principoj, kiu kontentigas la praktikan postulon de interkompreno.

Dum preskaŭ unu jardeko sisteme okupinte nin pri la leĝoj kaj la lingva materialo de Esp-o, ni plene scias, kion signifus tia promeso de lia flanko; — sed ni scias ankaŭ, ke tia homo kaj nur tia povus fari ĝin. 4. 7. 21.

\*) Ni jam antaŭ kelke da jaroj interkonsentis kun la eldonejo de la sistemaj seslingvaj ITW, (Ilustritaj Teknikaj Vortaroj) pri aperigo de esperanta suplemento de la volumo pri elektrotekniko (v. „Esperanto“ 1917, p. 111). Sed, komencinte pri la ellaboro kaj ektrinitinte kun la kunlaborantoj (inter ili du Ak-anoj), ni baldaŭ ĉesis rĉiĝinte per du ekonoj: per la ekonoj, ke la lingva materialo devas esti malkrudigata egalmezure (v. sub 5) kaj post deorigina revizio kaj ke kolektiva krea laboro de diverslokaj esperantistoj-neesperantologoj, almenaŭ ĉe la hodiaŭa aferstato, estas monstraĵo.

## El Varsovio.

La agado de Pola Esp. Societo, malgraŭ la someraj ferioj, tute ne ĉesis, dum lastaj tagoj eĉ plivigliĝis. La Ministerio de Eksterlandaj Aferoj ekinteresiĝis pri Esperanto, kaj la estraro de Pola Esp. Societo transdonis al ĝi memorskribaĵon pri utileco kaj disvastiĝo de nia lingvo. Se dum kelkaj tagoj oni donos favoran respondon kaj la urba konsilantaro konsentos helpi, varsoviaj esperantistoj ankoraŭ dum la Praha kongreso, malgraŭ la malfrua tempo, proponos aranĝi la sekvontan kongreson en 1922 en Varsovio.

La morto de nia eminenta samideano kaj honora prezidanto de Pola Esp. Sociero A. Grabovski estis granda malfeliĉo en unua vico por ni, ĉar ĝis la lastaj tagoj li ankoraŭ helpis kaj konsilis nin en nia agado.

Fondiĝis nova grupo de UEA kun pli ol 30 membroj; kiel delegito estas elektita s-o Stanislaw Karolczyk kaj vicdelegito s-o W. Miernicki.

## Internacia Esp. Servo.

(En la intereso de la esp. propagando estas dezirinde, la artikolojn sub tiu ĉi rubriko traduki kaj represigi en naĉaj ĵurnaloj, aldonante la vortojn „Internacia Esperanto-Servo“ kaj sendante 1—2 ekzemplerojn de la koncerna ĵurnalo al la redakcio de ET.)

### LETERO EL LITOVIO.

Kaunas, 20. julio 1921.

#### La prezoj por terkulturaj produktaĵoj.

Je komenco de somero la prezoj por terkulturaj produktaĵoj ne estis egalaj en tuta Litovio. En unu loko la prezoj estis altaj, en alia malaltaj, ĉar post la mondmilito ne estas ankoraŭ restarigita vigla komunikado. Sed konsiderante la mezajn prezojn, ni ricevos malsupre prezentitan bildon. Mi devas tie ĉi rimarki, ke la prezoj estas montritaj laŭ germana valuto, ĉar en Litovio oni uzas la saman valuton kiel en Germanio.

La prezoj valoras por unu pundo (t. e. proksimume 16,38 kilogramoj).

Prezoj por grajno.			
Sekalo	47 mk.	Vicio	40 mk.
Tridiko	72 "	Lino	48 "
Hordeo	40 "	Trifolio ruĝa	266 "
Aveno	38 "	" blanka	248 "
Pizo	46 "		

Prezoj por faruno.	
Sekala	49 mk.
Tritika	77 "
" bonspeca	125 "

Prezoj por grilo.	
Hordeo	76 mk.
Avena	89 "

Prezoj por viando kaj grasajo.			
Bovajo	110 mk.	Butero salita	582 mk.
Ŝafajo	100 "	" nesalita	604 "
Bovidajo	95 "	Oleo lina	464 "
Sebo	440 "		

Prezoj por vivaj birdoj.	
Kokino (unu ekzemplero)	21 mk.
Ansero	45 "
Anaso	26 "

Prezoj por brutaro.	
Cevalo	5500 mk.
Bovino	2200 "
Ŝafoj	170 "

Prezoj por nutraĵoj kaj paŝtaĵoj.			
Pajlo sekala,	por unu pundo		7 mk.
" de somera greno	" "		10 "
Fojno herbeja	" "		13 "
" marĉa	" "		10 "
" trifolia	" "		15 "

Prezoj por aliaj produktaĵoj.	
Ovoj (la deko)	7 mk.
Mielo (unu kilogramo)	30 "
Terpomo (unu pundo)	8 "

Ĉar la prezoj por diversaj terkulturaj produktaĵoj per si mem ankoraŭ ne montras la veran bildon pri la vivkosto, tial mi diros kelkajn vortojn pri tiel nomata budĝeto de litova civitano. El montritaj salajroj, laborpagoj aŭ laborenspezoj la legantoj sam konkludas la situacion de vivo en Litovio.

Ne ĉiuj litovaj civitanoj nuntempe havas la egalan laborenspezon, ĉar tio dependas de la specialeco, lerteco, instruiteco, fortikeco ktp. En la ŝtataj oficejoj la oficistoj ordinare ricevas de 800 ĝis 1400 markojn dum monato. Komprenible, estas tiaj oficejoj, kie oni ricevas pli multe. Sed tiaj oficejoj ne estas la multenombraj. La membroj de Sejmo (parlamento) ricevas 2000 (du mil) markojn. Kompostistoj en presejoj laborenspezas 1800—2500 markojn. Tiom proksimume ricevas diversaj metilistoj, kiuj scias sian specialecon. Laboristoj, kiuj nur plenumas simplan manan laboron, kie oni ne bezonas ian ajn specialecon aŭ scion, laborenspezas malpli da mono.

Kaunas (Litovio), A. Klimas.  
Keisruĉlo n-o 14, b. n-o 1.

## Lernejo.

La 12. julio okazis en la liceo de St. Omer solena disdono de premioj post la lerna jaro, sub la prezido de s-o Porte, akademia inspektoro. La unuan premion por la lernado de Esperanto, vojaĝon al Praha, gajnis lernanto André Prevost, la duan premion Michel Coolen. Krom tio estis donataj 4 certigoj pri la elementa kurso kaj 4 atestoj pri lernado. Estas grava fakto, ke la premioj por Esperanto estis disdonataj dum oficiala

ceremonio kaj ke la nomaro de la premiitoj aperis en la Oficiala Bulteno de la liceo. La honora prezidanto de la konkurso estis Ribot, Prezidinto de Ministra Konsilantaro kaj senatano. Ni dankas tiun ĉi rezultaton al nia modesta s-ano Deligny, profesoro en la sama liceo.

## Oficialaj Dokumentoj.

Letero de la Saksa Ekonomia Ministerio al la XIII-a Internacia Esp. Kongreso en Praha. 668 b, III P.

Dresden, 16. julio 1921.

La Saksa Ekonomia Ministerio sekvas viajn aspirojn kun granda intereso kaj deziras al via kongreso tre bonan sukceson. La Ekonomia Ministerio komisiis kiel sian reprezentanton la profesoron ĉe la Industria Akademio Chemnitz, s-on d-ron Fritz Wicke, kiu partoprenos la Kongreson en Praha.

Saksa Ekonomia Ministerio:  
subs. *Fellisch*.

Letero de la Germana Arme-Ministerio.

Berlin W 10, la 9. junio 1921.

Regna Arme-Ministerio.  
Armeestraro.  
Inspekto de l' edukado kaj klerigado.  
N-o 1120-4. 21. Inl. b.

Vian skribaĵon de 12. 4. 21 la inspekto legis kun granda intereso. Ĝi neniel malkonsideras la kreskantan signifon de Esperanto por la germanaj interesoj en la mondraftiko. Sed la troŝarĝo de l' armeo per plej urgaj taskoj ĉiuspecaj malebligas al ĝi nuntempe influi pro ĝia flegado en la armeo. Pli poste tiu ĉi demando estos zorge ekzamenata.

Por la inspekto:

La stabestro *von Falkenhansen*.

Al la Esperanto-komitato de la Germana Ligo por Ligo de Nacioj,  
Greifswald, Wolgasterstr. 38 b.

## Filatelo.

(Sendu ĉiujn informojn al s-o E. Fethke, Bydgoszcz, ul. Petersona 11, Polio.)

ARMENIO. Tri novaj pm. surhavantaj la nacian insignon: aglo tenanta en sia dekstra ungo glavon. 3 valoroj: 3 r. verda, 5 r. ruĝa, 10 r. blua.

AŬSTRALIO. Aperis 2 novaj valoroj: 2 p. oranĝ-kolora, 1/4 ŝil. helblua.

AŬSTRIO. Oni surpris la nunan serion per „Hochwasser 1920“. Oni vendis tiujn pm. trioble pli kare ol laŭ nominala valoro je helpo al la per superakvo (dum lasta aŭtuno) malutiligitaj aŭstraj teritorioj. 5 h. ĝis 20 kr. (20 valoroj).

BELGIO. La restprovizo de la Olympia-serio (3 valoroj) estas surprisita per „20 centimes“.

BRAZILIO. Aperis novaj pm.: 10 r. siringviola (lokomotivo), 20 r. bruna (lok.), 25 r. siringviola (Industrio), 50 r. verda (Industrio), 100 r. ruĝa, 150 r. viola, 200 r. blua (motivo pri aereturado), 300 r. grizbruna (komerco), 500 r. bruna (komerco), 600 r. ruĝa (ŝipveturado), 1000 r. brunviola (ŝipveturado), 2000 r. malhelviola, 5000 r. bruna (instruado).

CINIO. Bonfara eldono: Surpresita 2 cts. per ruĝa 1 ct., 4 cts. per blua 3 cts., 6 cts. per ruĝa 5 cts.

DANZIGO (Liberŝtato). Aerpoŝtmarkoj: la Danziga Mariapreĝejo kun transluganta aereturilo 40 pf., 60 pf., 1 mk., 2 mk. kaj 5 mk.

FINNLANDO. Surpresita 30 p. sur verda 10 p., 60 p. sur siringviola 40 p., 90 p. sur rozkolora 20 p., 1 1/2 mk. sur malhelblua 50 p. — En la nova serio aperis 25 mk. ruĝa-flava, 3 mk. helblua-griza, 2 mk. verda-griza.

GERMANIO. Aperas novaj pm. kun cifermodejoj. Ĝis nun oni eldonis 3 valorojn: 5 pf. rozkolora, 10 pf. malhelverda, 30 pf. helverda.

GREKIO. Aperis en Korfu 6 pm. montrantaj la kapon de Venizelos: 5 lepta verda, 10 l. ruĝa, 20 l. rozkolora, 25 l. blua, 50 l. siringviola, 1 dr. flava.

HUNGARIO. En malgranda formato: 50 fl. helverda, 60 f. nigrebruna, 2,50 kr. helblua.

JUGOSLAVIO. Porinvalidaj pm.: 10, 15, 25 para, Bonfaraj pm. 10 plus 10 para ruĝa, 15 plus 15 malhelbruna, 25 plus 25 malhelblua.

LITOVIO. 2 novaj pm.: 50 sk. olivkolora (kamparano la falĉilon akriĝanta), 1 mk. brunaverda (princo Kleistutis).

LUKSEMBURGIO. Surpresita 17 1/2 sur 20 cts., 3 sur 2 cts.

MEZA LITOVIO. Postpag-poŝtmarkoj: 50 pf., 1, 2, 3, 5 mk. — La lastaj 2 eldonoj estis parte surprisita per „Na Slask 2 mk.“ („Por Supra Silezio“) kaj poste kun ruĝa kruco. — Nova arta eldono: 1—20 mk.

POLIO. En malgranda formato (aglodeseĝnajo) aperis 4 mk. helruĝa. Je memoro de restarigo de la paco inter Rusio kaj Polio aperis pm. po 10 kaj 15 mk. montrantaj semantan kamparanton. En la profundo vidiĝas la ĉielarko kiel simbolo de paco. La glavo estas fiksita en la tero. — Memoraj pm. pro restarigo de la konstitucio: 7 valoroj (3 artaj diversaj deseĝnajoj) po 2, 3, 4, 6, 10, 25 kaj 50 mk. — Postpag-pm. po 6, 8 kaj 20 mk.

PORTUGALIO. Novaj valoroj aperis: 6 c. blua, 12 c. verdnigra, 60 ç. blua, 80 c. viola, 90 c. blua, 1 esc. viola, 1,10 esc. bruna, 1,20 esc. bruna.

SAAR-TERITORIO. Aperis tute nova, bela serio (preskaŭ ĉiuj pm. dukoloraj) montranta vidindajn aĵojn el la Saar-teritorio: 5 pf. ĝis 25 mk. (16 valoroj). — Pro enkonduko de la franca monkurzo oni devis denove surprisi la lastan serion per cents kaj francs.

SUPRA SILEZIO. Je memoro de la voĉdonado aperis la lasta serio (packolombo) la 20-an de marto kun surpriso „Plébiscite 20 mars 1921“.

SVEDIO. Aperis nova serio kun la kapo de la reĝo: 5, 10, 20, 25, 40, 75 öre.

SVISIO. Oni surpris 2 r. pm. per 5 kaj 25 r. pm. per 20.

## Grafologio.

Gesamideanoj dezirantaj elkoni sian karakteron, emojn, kvalitojn, sendu 2 paĝan leteron, sen pripense skribitan sur senlinia papero, al Grafos, Castella Postale 47, Pisa, (Italio), aldonante 6 R.-K. aŭ ilian prezon en sia nacia mono. La respondoj aperos en ET.

BATALANTO. Klereco, imagemo, spriteco, logiko, kritikemo, energio, aktiveco, larĝa animo, forta sentemo, nepacienco, sinkaŝemo.

Via dubo pri duspeca skribo ne havas fundamenton; veran grafologiiston ĝi ne povas nepre erarigi. Ne esperantajn skribaĵojn mi povas plene ekzameni, preferante tamen tiujn de samideanoj.

MARAT. Energio, perforta persista volo, firma logiko, progresemo, rapideco, decidemo, sentemo, kuraĝo.

Mi kredas, ke per tiuj kvalitoj vi sukcesos dum la vivo; klopodu ankaŭ por esperantistigi viajn amikojn per la certa influo, kiun vi havas sur ilin.

ROBESPIERRE. Trankvileco, simpleco, malvarmeco, egoismo, ebleco pliboniĝi, personeco ne plenformita. — Krom la sangavideco, la pseŭdonimoj ŝajnas tre konvenaj.

ZEUS. Konstanta, ne tre forta volo, spriteco, malforta imagemo, sinkaŝemo, vanteco, sindeteno.

HUNDESTRO. Klereco, energio, aktiveco, lerteco, bongusto, spriteco, ambicio, gajeco, bona sano, juneco, profunda sentemo, lojaleco, fideleco. — Simpatia karaktero, kies estiminda posedanto certe sukcesos bonege. *Grafos*.

## Parolejo.

La artikolo de s-o Karlo Minor en la lastaj n-oj de ET elvokis sufiĉe multe da kontraŭparoloj, kio cetere estis antaŭvidebla. Ni publikigos ilin en iu venonta numero, se estos loko.

Ankaŭ pri la temo „Esperanto kaj Politiko“ ni ricevis diversajn alskribaĵojn; sed pro manko de tempo kaj loko ni nun ne povas pritrakti tiun temon.

La morton de nia kara samideano

## Voldemar Aro

dolore funebras  
Estonia Esp. Unuiĝo „Espero“.

## La Lastaj Tagoj de D-ro Zamenhof

Memorlibreto, presita sur arta papero, kun 11 ilustraĵoj laŭ originalaj fotoĝrafajoj pri la funebra ceremonio kaj la tombo de la Majstro,

### estos vendata

dum la kongresoj en Dresden kaj Praha po 30 germ. mk. resp. 30 ĉsl. kr. La duono estas destinita

### por Monumento

sur la tombo de D-ro Zamenhof.

Ni rekomendas la belan verketon al la atento de ĉiuj samideanoj.

## Natur-Teatro (Tagluma Scenejo) Freiburg i. Br.

(200 m. larĝa, 100 m. profunda, la plej granda en la mondo.)

## PASIO-FESTLUDOJ

laŭ la originalteksto de Oberammergau sub gvidado kaj kunefiko de la famekonataj bavaraĵ Kristo- kaj Judas-prezentantoj Adolfo kaj Georg Fassnacht.

Ludotagoj de 16. julio ĝis fino de sept., ĉiun merkredon, sabaton kaj dimanĉon. 1500 kunefikantoj.

Korusoj. — Orkestro. — Granda Orgeno. Muzika gvidado: Franz Philipp.

La tribunon por la spektantoj enhavas 9000 lokojn.

Prospektoj pri enirprezoj kaj loĝejoj estas riceveblaj de la centrejo

B. Gotthart, Kaisersstr. 132, tel. 879.

La Festluda Direkto.

## Niaj novaj Abonprezoj.

Ni liveras al ne-germanaj landoj: 52 n-ojn (tuta jaro) por 100 germ. mk., 10 sil., 10 sv. fk., 20 fr. fk., 5 hol. guld., 10 skand. kr., 2 dolaroj aŭ 25 liroj (lirojn ni akceptas nur el Italio); 26 n-ojn (duona jaro) por duona prezo. Al Baliko kaj Balkano ni liveras 26 n-ojn por 25 germ. mk., al Polio 250 pmk., al Finnlando 25 fmk., al Aŭstrio 100 kr., al Hungario 75 kr., al Ĉeĥoslovakio 35 kr.

Oni pagu per monbiletoj aŭ bankĉekoj, sed ne per poŝtavizoj, ĉar la poŝto donas parte nur 2/3 de la kurza valoro.

La abonon povas esti komencataj per la ajn numero Germanoj; abonon ĉe la poŝto (poŝta gazetlisto, komplementoj 5 kaj 9); kvaronjare 15 mk.

## Anoncoj

kostas po kvadracentimetro 1 germ. mk.; ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj rabato ĝis 40% (por abonantoj kaj esp. firmoj kromrabato de 20%).

### Anoncetoj

kostas por 1-2foja enpresoj kaj po 25 vortoj la prezon de 5 n-oj de ET aŭ 5 germ. mk. aŭ 5 resp.-kup. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la monon de la abonkonto (5 n-oj). Por 3-5foja enpresoj ni kalkulas la duoblon. Familiaj anoncetoj (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto) estas senpagaj.

### Anoncetoj pri korespondo kaj interŝanĝo

kostas por 1-2foja enpresoj kaj po 15 vortoj la prezon de 3 n-oj de ET aŭ 3 germ. mk. aŭ 3 resp.-kup. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la monon de la abonkonto (3 n-oj). Por 3-5foja enpresoj ni kalkulas la duoblon.

Estonte ni forlasos rimarkojn pri „ĉiama kaj tujarepondo“, ĉar ni kredas, ke por ĉiu anoncanto estas morala devo respondi.

Germanoj povas pagi monon al nia poŝtĉekkonto: Köln 70863 por Teo Jung, Horrem.

## Anoncetoj.

ATENTU! Ni serĉas ĉ. 50 gejunulojn el diversaj landoj por aranĝi interesan intiman rondon korespondan. Ĉefkondiĉo: perfekteco en Esperanto. Mallonga biografio dezirata. Detalaj informoj volonte donataj. Fratj Fethke, Bydgoszcz (Polio), ul. Petersona 11.

PETO AL HOLLANDANOJ. Du 22-jaraj s-anoj, metiistoj, intencas elmigri Holandon; pro tio ili deziras interrilati kun holandaj gesamideanoj, kiuj ebligus trovi laboron (tajloroj). — Ges-anoj, kiuj estus emaj helpi, estas petataj skribi al Willy Puls, Gelsenkirchen, Germ., Grenzstr. 116-IV.

SARATOV (Rus.) Doktor-edzino Valerio Soloneviĉ-Kunz petas samideanojn en Saratov (Rusujo) scilgi ŝiajn gepatrojn (ges-oj Kunz, Pokrovskaja 26, aŭ Rus-Azia Banko, s-o Ivanoviĉ Kunz), ke ŝi nun loĝas en Polio, urbo Zychlin, distrikto Kutno, lando Varsovia.

EDZIĜO. Laboristo, ĉ. 35-jara, deziras konatiĝi kun samaga esperantistino de kiu ajn nacieco por eventuala edziĝo. Alskriboj kun fotografiaj estu adresataj al s-o D. Holm, Källgatan 4, Eskilstuna, Svedio.

RUSAJ DRAMAJ ARTISTOJ interŝanĝe deziras ricevi notojn por kantado, novajn teatrajn verkojn en esperanta, franca, itala, rusa lingvoj, — esperantan literaturajn, gazetojn ktp., ilustr. kartojn pri teatraj spektakloj. Ni tre dankeme sendos rusajn esp. literaturajn, gazetojn, muzikaĵojn, papermonojn, poŝtmarkojn ktp. Skribu al: Drama artisto V. J. Kaĉalin, Petrogrado, Mitavskij, pereulok domo n-o 3, kvart. n-o 27.

### Korespondo kaj Interŝanĝo.

Kiu sendos al mi 30-50 nesamajn poŝtmarkojn de sia lando, ricevos same tiom da germanaj poŝtmarkoj. Hermann Wolfert, instruisto, Menzelen-West, Rejnlando, Germ.

S-o Andor Spiro, Miskolcz, Hungarujo, Templom u. 5, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Mi atendas markojn unue.

S-o Bruno Ebert, Bydgoszcz-Okole (Pol.), Wroclawska 6, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj korespondadi per ilustr. poŝtkartoj.

S-o Bronislaw Kruszczyński, Bydgoszcz (Pol.), Siemiradzkiego 10, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj belajn vldindaĵojn. Ĉerte al ĉiu respondos.

Siedlce, str. Kilniskiego 11, Polio, s-o K. Bujnowski, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., poŝtmarkojn, leterojn kun ĉiuj landoj; ĉerte respondos.

Siedlce, str. 3-go Maja 28, Polio, s-o Cz. Pruski, del. UEA, deziras korespondi kun partoprenantoj de la XIII-a.

S-o Rudolfo Appel, Budapest IX, Ŭllői ut 50, Hung., deziras korespondi kun ĉiulandanoj.

S-o Adalberto Welz, Budapest IX, Ŭllői ut 63-1-5, Hung., deziras korespondadi kun ĉiuj landoj per ilustr. poŝtkartoj; tuj respondos.

S-o Haluska Akos, teknikisto, Budapest VII, Hernad u. 26-III-30, Hung., deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo; ĉiam respondos.

S-o E. Friebe, instruisto, del. de UEA, Dresden-Dobritz, Residenzstr. 24, l., serĉas gekorespondemulojn en la tuta mondo. (Leteroj pri ĉiu temo, il. poŝtkartoj de vidindaĵoj, de la popola vivo.) Donas informojn pri komerco kaj industrio en sia regiono. Preferas neinterrompitan korespondadon.

Chr. Meyer, Kernstrasse 44, l., Nürnberg, Germ., deziras korespondi kun geksterlandanoj per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj. Tuj respondos.

S-o Georg Vogel, Breslau, Germ., Gartenstr. 28, pir., deziras korespondadi letere aŭ poŝtkarte kun ĉiulandanoj. Poŝtmarkoj bildflanke.

S-o Walter Beer, Breslau, Friedrichstr. 12, deziras korespondadi kun geanoj de ĉiuj landoj per bildkartoj. Poŝtmarkoj bildflanke.

S-o Alfred Neupert, Leipzig-Mb., Wedellstr. 17, Germ., deziras korespondadi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiulandaj samideanoj (precipe pri lernei-aferoj).

N. M. Ivanov-Kaljanov, urbo Urfum, Vjatka gubernio, Rusio, Revolucionnaja 4, deziras korespondi ĉiuteme kun la tuta mondo en la lingvoj esperanta, germana, franca kaj itala. Li ĉiam nepre respondos. Interŝanĝas ankaŭ poŝtmarkojn. Vladimiro Katalinov, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj, per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr. Tuj respondos. (15-jara.) Adreso: Petrogrado, Gorohovaja 33, loĝ. 13.

Aleksandro Dmitrijev, 15-jara, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj, per leteroj kaj ilustr. poŝtkartoj. Tuj respondos. Adreso: Rusio, urbo Velikije-Luki, Baranovskaja st. 28.

Ĉiuj gesamideanoj, kiuj sendas ĉ. egalval. nedif. stampitajn poŝtmarkojn negermanajn, tuj ricevos 10 aŭ 20 poŝtmarkojn ilustritajn de la beleaga Rejnlando. Paul Becher, Köln a. Rh., Burgunderstr. 7. — Ankaŭ korespondas per poŝtkartoj, leteroj (bfl.) kun ĉiuj landoj.

S-o Liudas Alaeika, Siauliai, Litovio, Pasadna g-ve 19, interŝanĝas per poŝtkartoj (bfl.).

F-ino Eugenia Butneviĉaite, Siauliai, Litovio, Stotes g-ve 8, interŝanĝas kaj korespondas per poŝtkartoj (bfl.).

F-ino Zofia Valcekauskaitė, Siauliai, Litovio, Pasadna g-ve 19, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bfl.).

Kiu sendos al mi 30-50 nesamajn poŝtmarkojn de sia lando, ricevos same tiom da germanaj poŝtmarkoj. Hermann Wolfert, instruisto, Menzelen-West, Rejnlando, Germ.

Fritz Thiel, Swinemünde (Germ.), Seestr. 2, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

# 7<sup>a</sup> Internacia Foiro de Breslau

Aŭtuna Foiro :: 4-a ĝis 8-a de Septembro 1921.

Teksajoj, ledajoj, ŝuoj, ornamaĵoj kaj artmetiaj objektoj, meblaro, pormaŝtrud-artikloj, sportbezonaĵaro, papero kaj paperajoj, kontor-uzaraĵo, manĝaĵoj kaj ĝuaĵoj, kemiaj- . . . . . teknikaj artikloj. . . . .

Informojn donas:

## Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.

ESPERANTO-FAKO

BRESLAU I (Germ.), Ohlauerstr. 87.

## Hungara Ĝenerala Kreditbanko Budapest

■■■■■■■■■■

La plej granda hungara banko kun interrilatoj en ĉiuj landoj.

Akcia kapitalo kaj rezervofondoj: hung. kr. 9000000.

Kvin filioj en Budapest.

Filioj en: Brasso, Debreczen, Fiume, Győr, Kassa, Kecskemet, Nagyvarad, Pecs, Pozsony, Satoraljaiújhely, Szabadka, Temesvar.



## LEIPZIG-A SPECIMENFOIRO

FOIRO

POR TEKNIKO KAJ KONSTRUEFAKO

Aŭtuna Foiro 1921 de la 28<sup>a</sup> de aŭgusto ĝis 3<sup>a</sup> de septembro  
Printempa Foiro 1922 de la 5<sup>a</sup> ĝis 11<sup>a</sup> de marto

La centra merkato por la internacia komerco kaj ofertado

Same grava por ekspozitaĵoj kaj por aĉetantaĵoj

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN

IN LEIPZIG

(Foiro-ficejo por la Specimenfoiroj en Leipzig)

JOHANNES-TECHNICHOLD-LEIPZIG

## „SCHARLACH“ ACETILEN-LAMPOJ

por domo, metio, industrio, trafiko kaj agrikulturo.



Tablo- kaj muro-lampoj. — Ĉiuspecaj lanternoj.

Seriozaj firmoj postulu katalogojn kaj detalojn.

Fabriko de Metalajoj

Otto Scharlach, Nürnberg, (Germanujo).

## Sinjoroj Esperantistoj!

Se vi volas helpi serioze la internaciigon kaj disvolvigon de la lingvo Esperanto, abonu senpere je la nova internacia ilustrita semajna gazeto

## „De Prinses“.

Provizore tiu ĉi semajna gazeto aperos en la franca, germana, angla, holanda kaj esperanta lingvoj. Ĝi enhavos ĉion tutmondan (ekz. sporto, arto kaj sciencoj, agrikulturo, brutarbredado ktp., mallongvorte „la naturo en vorto kaj bildo“ de la tuta mondo).

Sendu vian abonon kaj pagon senprokraste al nia reprezentanto s-o J. J. v. Wensveen, Warmoesstraat 118, Wormerveer, Holando. Ekzemplero 15 cendojn plus afranko. Jarabono plus afranko: 7 guldenojn 80 cendojn.

Abonu tuj je tiu ĉi interesa gazeto! Kolportistoj havas rabaton.

## Romualdo Colivicchi

Skulptisto

VOLTERRA, TOSCANA, ITALIO.

Premiita laborejo por skulptaĵoj en

## Castellina Marmoro (Alabastro).

Specialaĵoj:

Polikromataj artist-laboraĵoj, lampoj, vazoj, objektoj por elektra lumigado.

Ĉiuspecaj artist-laboraĵoj estas ĉiam preparataj. Oni deziras agentojn kaj reprezentantojn en ĉiuj landoj.

Oni korespondas en Esperanto.

## Esperanto kaj la Komerco.

Firmoj, foiroj, esperantaj komercaj grupoj kaj esperantistoj bonvoĉu komuniki al mi la spertojn faritajn koncerne la praktikan uzadon de Esperanto.

Otto Pilhofer, Nürnberg 19, Germanujo.

## Franco

kun bonaj referencoj komercaj deziras

## reprezenti en Paris

eksterlandajn firmojn pri ĉiuj

## komercaĵoj

kaj produktoj. Donos komercajn informojn pri francaj komercaĵoj. Perfektaĵo diskreteco kaj honesteco.

Adresu ĉion al

## S-o Emile Béchet

28, rue Leroyer, Vincennes (Paris).

## Poŝtmarkoj Nederlandaj.

Ĉiu, kiu sendos al mi minimume 200 da afrank-litotropiaj, kampopostaj, aerpostaj poŝtmarkoj de sia lando, ricevos de mi saman kvanton da nederlandaj poŝtmarkoj. Skribu legeble vian adreson.

S-o C. D. de Smet, Noorddijk 60, Wormerveer, Holando.

## Plej malkaraj esperantaj libroj:

Kabe, Internacia Krestomailo	germ. mk.	6.—
Belmont, Sonoj esperantaj	"	5.—
Stenkiewicz, Kio okazis foje en Sidono	"	2.—
" Ni sekvu Lin	"	3.—
Reymont, En fumejo de l' oplo	"	3.—
Fredo, Consilium facultatis	"	4.—
Div. aŭtoroj, Kelkaj noveloj	"	5.—
Grabowski, El Parnaso de Popoloj	"	10.—
Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1908	"	10.—
Bela Manto, La dorna karesilo	"	4.—

Riceveblaj ĉe

## Ksaw. Alfus, Tarnow (Pol.),

Wied. Bank Związk,

kontraŭ sendo de mono en rekom. letero.